     sobie trudu  
 peni starać się  
 erari błędzić  
 petoli swawolić  
 presi drukować  
 bindi oprawiać książki  
 parkere na pamięć  
 vane napróżno  
 okaze przypadkiem

for precz  
 supre na górze  
 malsupre na dole  
 tuj zaraz  
 jus właśnie  
 jam już  
 preskaŭ prawie  
 precipe szczególnie  
 sufiče dostatecznie  
 tro zanadto  
 jen... jen... jużto... jużto  
 ju... pli im... tem

## Dziewiąta lekcya. Naŭa leciono.

Gramatyka: Spójnik.

Słownictwo: Przystawki **dis -**, **ek -**, **re -**, — Słowa złożone z **-edz -** i **-edzin**. — Ćwiczenia.

### Gramatyka. Gramatiko.

Spójnik. Konjunkcio.

Ważniejsze spójniki są:

ke, że (skutk.), aby (celow.)  
 se jeżeli  
 êu czy  
 êu... êu... czy... czy  
 ĉar ponieważ  
 ĝis aż, dopóty  
 kvankam chociaż  
 kvazaŭ jakby  
 kiam kiedy, gdy  
 tuj... kiam skoro tylko

dum podczas gdy  
 porke = por ke aby  
 por aby  
 nur se chyba że  
 se nur byleby  
 eê se chociażby  
 laŭ wedle  
 laŭ tio se według tego  
 antaŭ ol zanim  
 anstataŭ zamiast

esceptinte ke, z wyjątkiem	nek ani
gdy	tamen jednak
ja wprawdzie, wszak	sed lecz itd.

Spójniki rządzą trybem oznajmującym, jeśli czynność jest pewna, rzeczywista: kvankam mal-frue li venis, tamen li venis chociaż późno przybył, jednak przybył, mi esperas, ke li venos spodziewam się, że on przybędzie, mi ĝojas, ke li estas feliĉa cieszę się, że on jest szczęśliwy.

Jeśli czynność jest wątpliwą lub warunkową, wtedy używa się trybu warunkowego: se li povus, li certe venus gdyby mógł, przybyłby pewnością, mi ĝojus, se li estus feliĉa cieszyłbym się, gdyby on był szczęśliwy,

Czynności oznaczające rozkaz, życzenie, lub cel wyraża się trybem rozkazującym: ordonu, ke li venu rozkaz, żeby on przyszedł, estas necese, ke li venu jest koniecznym, żeby on przyszedł, mi deziras, ke li estu feliĉa ja życzę sobie, żeby on był szczęśliwy.

Spójniki **antaŭ ol**, **anstataŭ** i **por** rządzą trybem bezokolicznym; **se** w znaczeniu jeżeliby, gdyby, rządzi trybem warunkowym; **por ke** i **ke** (celowe) rządzą trybem rozkazującym.

## II. Słownictwo. Vortfarado.

Przystawki. Prefiksoj.

**dis** - oznacza rozdział, rozdrobnienie: ĵeti rzuć **dis**ĵeti rozrzucić, semi siaĉ **dis**semi rozsiać,



pele pędzić, **dis**pele rozpędzić, doni dawać, **dis**doni rozdawać, ŝiri rwać, **dis**ŝiri rozerwać, ŝuti sypać, **dis**ŝuti rozsypać itp.

**ek** oznacza początek lub krótkotrwałość czynności: kanti spiewać, **ekk**kanti zaspiewać, flami płonąć, **ek**flami zapłonąć, flori kwitnąć, **ek**flori zakwitnąć, vidi widzieć, **ek**vidi zobaczyć, krii krzyczeć, **ekk**krii zakrzyknąć itd.

**re-** oznacza zwrot lub powtórzenie: doni dać **re**doni oddać, veni przybywać, **re**veni powrócić, diri powiedzieć, **re**diri odpowiedzieć, memori pamiętać, **re**memori przypomnieć sobie, skribi pisać, **re**skribi odpisać itd.

**-edz-** i **-edzin-** dodają się również jako wstawki i tworzą w ten sposób nowe słowa: doktore**dzino** żona doktora, lavistine**dz**o mąż praczki itd.

## Ćwiczenia, Ekzercoj.

1.

Mi kredas, ke la scienco estas potenca progresadilo, kaj ke ĝi pli kaj pli kondukos la homaron al la vereco. — La homoj diras, ke, se ili estus riĉaj, ili donacus multan monon al la malriĉuloj. Ĉu ili efektive tiel agus? Ĉar vi ne venis hieraŭ, mi pensas, ke vi venos morgaŭ. Diru, kiam vi alvenos, por ke mi estu hejme. — Tuj, kiam li ekparolis, mi aŭdis, ke li estas kortuŝita, kaj ke li donos la petitan permeson. — Antaŭ ol ĵugi,

aŭskultu nin. — Tial ke vi estas ĝentila mi tion donos al vi, porke vi estu rekompencota. — Vi jam donis al mi ion, por ke mi estu rekompencata. Nun mi estas sufiĉe rekompencita. — Mi atendas vin, esceptinte ke vi estos malsana. — Kvankam mi iom malsanetas, tamen mi venos, ĉar mi sendube preferas viziti vin, anstataŭ enui sola. — Diru al la servistino, ke ŝi ekbruligu la lampon kaj ke ŝi remetu la meblaron en ordo. — Tiu artisto ekkoleras facile, kvazaŭ li estus ĉiam ofendita, kvankam ĉiuj estas tute singardaj ne ekvundi lian tre ofendeman fierecon. — Tutkore mi gratulas vin pro via bonega akiraĵo. Vi estis tre prava aĉeti ĉi, tiun bienon.

## 2.

Żałuję bardzo, że dzisiaj nie przyszedłeś, spodziewam się jednak, że jutro przyjdiesz. — Chociaż on tego nie powiedział, wiemy jednak dobrze, co on myśli i co on robi, albowiem znamy go dobrze. — Ponieważ mi to przyrzeczono, oczekuję więc pewnie. — Ty mówisz tak głośno, jakgdybym był głuchy. — Co byś zrobił, gdyby on źle postępował? Zamiast się gniewać, odszedłbym, chyba że byłbym zmuszonym zostać. — Chciej pan powiedzieć piekarzowi, żeby nam przynosił chleb codziennie o 12-tej godzinie i żeby nie zapomniał przynieść nam dzisiaj bułki. — Rozkaza-

łem żonie odźwiernego, żeby nieznanym osobom nie wpuszczała do mego domu, zwłaszcza wieczorem i w nocy. — Zdaje mi się, iż my nie powinniśmy się rozchodzić, nie podziękowawszy wujowi najserdeczniej za przyjemność, jaką nam sprawił, pozwalając oglądać zbiór swych starożytności. — Bawiliśmy się bardzo dobrze a teraz zadowoleni powrócimy wszyscy do domu.

## 3.

Via frato venu tuj, mi petas, ĉar mi bezonas paroli kun li hodiaŭ. — Konvenas, ke la parolanto elparoladu korekte kaj laŭte, porke ĉiuj aŭskultantoj bone komprenu lin. — Diru al viaj lernantoj, ke ili reportu en la lernejon ĉiujn librojn, kiujn ili tralegis. — Mi donacus al via aminda fratino flo-rojn, sed mi ne estas certa, ĉu ŝi ne rifuzos ilin. — Tuj, kiam la fratino vidis sian fraton, ŝi ekplendis, ke li, anstataŭ skribi leteron ĉiusemajne, nur malofte donis signon de vivo, sed li respondis, ke ŝi estas malprava. — Kvankam mi tre afable rein-vitis viajn gepatrojn, ili ree ne akceptis mian inviton; ĉu tial, ke ili estas tro maljunaj kaj malfortaj, ĉu tial ke ili timas enui en nia societo. — Antaŭ ol ekparoli, oni devas bone pripensi. — Por ke vi estu prava, estus necese, ke la homaro, estu perfekta, sed vi scias tiel bone, kiel mi, ke tio ne

estas ebla. — Ne disĵetu papererojn en la ĝardeno  
Mi ne kredas plu, ke li venos, kaj tion mi tre be-  
daŭras.

## 4.

Skoro tylko otrzymałem twój bilet, natych-  
miast zacząłem pisać, jednak praca moja nie jest  
jeszcze skończoną. — Ażeby te dobra ziemskie  
mogły do niego należeć, musi je kupić, albo mu-  
siałyby mu je kto podarować, sędzę jednak, iż jest  
za biednym, aby mógł je kupić a jestem pewny,  
że terazniejszy posiadacz mu ich nigdy nie daruje. —  
Abyś stracony czas mógł napowrót odzyskać, mu-  
siałyś cały dzień i noc pilnie pracować. — Jeśli  
moi rodzice pozwolą, pójdę z tobą, jednak boję się,  
czy pozwolą, chociaż już dzisiaj czuję się dużo  
lepiej niż wczoraj. — Nasz stary przyjaciel, sędzia,  
powiedział nam, iż bardzo często są ludzie nie-  
sprawiedliwie sądzeni według tego, czy są ubodzy  
czy bogaci. — Młody lekarz rozdzielił pomiędzy  
wszystkich biednych we wsi jałmużnę, chociaż  
sam nie jest bogatym człowiekiem.

**Rozmówki. Interparoloj.**

Sofio. — Ernesto. — Nikolao.

Sofio.

Bonan tagon, sinjoro; kiel vi fartas?

Ernesto.

Tre bone, mi dankas (aŭ: dankon), kaj vi, sinjorino?

Sofio.

Bone, mi neniam fartis pli bone ol de kelka tempo.

Ernesto.

Kiu venas tie? Ĉu ne estas nia amiko Nikolao N..., la instruisto?

Sofio.

Jes, estas li. Mi lasas vin. Fartu bone! (Ŝi foriras).

Ernesto.

Bonvenon, amiko. Kiel vi fartas nun? Ĉu via familio estas en bona farto?

Nikolao.

Mia edzino ĉiam estas sana, sed unu el miaj infanoj havas mienon tre malbonan; ĝi ne havas plu apetiton kaj ĉiam plendas pri kapdoloroj.

Ernesto.

Eble tio ĉi venas nur el tro rapida kresko; la kreskado tre lacigas la infanojn.

Nikolao.

Tion ĉi vi diras por trankviligi min, sed ĉar vi mem estas patro, vi certe komprenas mian timon.

Ernesto.

Sendube... Nu, adiaŭ. Mil amikajojn al via frato. Salutu vian patron de mi kaj prezentu mian respektan submetigon al via edzino.

Nikolao.

Certe, mi ĝin faros. Viaflanke ne forgesu revoki min al la memoro de viaj gepatroj. Ĝis revidô!

Według L. Beaufronta.

### Słówka. Vortoj.

scienco nauka, wiedza

arto sztuka

gusto smak

religio religia

pacienco cierpliwość

pasio namiętność

kolero gniew

timo strach

humoro humor

pastro ksiądz

almozo jałmużna

tombo grób

leĝo prawo

rajto słuszność, prawo

paco pokój (spokój)

industrio przemysł

komerco handel

poŝto poczta

signo znak

stacio stacya

raso rasa

gento plemie, ród

reĝo król

regno państwo

bieno dobra ziemskie

potenca potężny

fiera dumny

modesta skromny

ĵaluza zazdrosny

egala równy

efektiva rzeczywisty

perfekta doskonały

libera wolny

prava esti mieć słuszność

certa pewny

sama ten sam

agi czynić, działać, postę-

pować

bapti chrzcić

beni błogosławić

preĝi modlić się  
 permesi pozwalać  
 saluti pozdrawiać  
 voki wołać  
 konduki prowadzić  
 prezenti przedstawiać  
 gardi strzec  
 danci tańczyć  
 festi świętować  
 kondamni zasądzać, ska-  
 zywać  
 savi ocalić  
 militi wojować  
 paŝi strzelać  
 vundi ranić  
 sendi posełać  
 donaci darować  
 ricevi otrzymać  
 gajni wygrywać, pozyskać  
 akiri osiągnąć, zdobyć  
 mezuri mierzyć  
 ofendi obrazić

plendi skarżyć się  
 bedaŭri żałować  
 aparteni należeć  
 posedi posiadać  
 decidi rozstrzygać, posta-  
 nowić  
 danki dziękować  
 ĉagreni martwić  
 enui nudzić się, tęsknić  
 amuzi bawić  
 daŭri trwać  
 ĉesi przestawać  
 ĵeti rzucać  
 peli pędzić  
 ŝajni zdawać się  
 gratuli gratulować  
 envii zazdrościć  
 helpi pomagać  
 zorgi troszczyć się  
 t. e. (tio estas) to jest  
 sendube bez wątpienia  
 adiaŭ (pożegnanie)

## Dziesiąta lekcya. Deko leciono.

Gramatyka: Czasy złożone str. cz. — Imiesłów.

Słownictwo: -ĉj-, -nj-, -um-. Moŝto. Ćwiczenia.

### I. Gramatyka. Gramatiko.

Czasy złożone. Tempoj malsimplaj. (Kunmetitaj).

Czasy złożone strony czynnej urabia się przez połączenie odpowiedniego imiesłowu ze słówkiem „esti“.

mi, vi, li, ŝi, ĝi, oni, ni, vi, ili

estas amanta właśnie zaczynam... zaczynają kochać

„ aminta pokochałem... pokochali

„ amonta \*) mam... mają zamiar kochać

estis amanta właśnie zacząłem... zaczęli kochać

„ aminta pokochałem był... pokochali byli

„ amonta \*) miałem... mieli zamiar kochać

estos amanta właśnie zacznę... zaczną kochać

„ aminta pokocham... pokochają

„ amonta \*) powezmę... powezmą zamiar kochać

estus amanta właśnie zacząłbym... zaczęliby kochać

„ aminta pokochałbym... pokochaliby

„ amonta powziąłbym...powzięliby zamiar kochać.

Imiesłowu, zwłaszcza strony czynnej używa się bardzo często w formie przysłówkowej, gdy odnosi się do rzeczownika, lub zaimka, od którego jest zawisłym: kantante ŝi ĉarmis lin spiewając czarowała go, traleginte la libron, li metis ĝin en ŝrankon przeczytałwszy książkę, włożył ją do szafy.

Podobnie bywa używanym przymiotnik, jeśli się odnosi do wyrazu bezokolicznego lub do treści całego zdania: estas necese, ke li venu (jest) potrzeba, żeby przyszedł, danĝere estas rajdi sur leono jest niebezpiecznie jeździć na lwie.

\*) prawie nie używa się.



## II. Słownictwo. Vortfarado.

### Wstawki. Sufiksoj.

**-um-** niema osobnego znaczenia; używa się wstawki tej wtedy, gdy wszystkie inne nie nadają się lub nie określają dokładnie danego pojęcia: plena pełny, plenumi spełnić, butono guzik, butonumi zapinać, varma ciepły, malvarmumi przeziębic się, gliti ślizgać się, glitumi ślizgać się na łyżwach, kolo szyja, kolumo kołnierz, mano ręka, manumo manszet, buŝo usta, buŝumo kaganiec, nazo nos, nazumo cwikier, akvo woda, akvumi nawodnić, aero powietrze, aerumi wietrzyć, vento wiatr, ventumi wachlować, palpebro powieka, palpebrumi mrugać, aminda godny kochania, amindumi umizgać się itd.

**-ĉj-** dodane do 2—5 liter imienia męskiego zamienia je na pieszczotliwe: Johano—Johanĉjo — Joĉjo Jaś, Miĥaelo — Miĉjo Michaś, Petro — Peĉjo Piotruś itd. tak samo patro — paĉjo ojczulek.

**-nj-** dodane do 2—5 liter imienia żeńskiego zamienia je na pieszczotliwe: Mario = Marinjo = Manjo Mania, Sofio = Sofinjo = Sonjo Zosia itd. tak samo patrino — patrinjo = panjo mateczka.

### Tytuł. Titolo.

Tytuł spełnia wyraz **moŝto** Mość: imperiestra moŝto (imperiestro cesarz), reĝa moŝto (reĝo król), princa moŝto (princo książę), grafa moŝto (grafo

hrabia), barona moŝto, sinjora moŝto, pastra moŝto (pastro kŝiadz), episkopa moŝto (episkopo biskup), ĉefepiskopa moŝto (ĉefepiskopo arcybiskup), papa moŝto (papo papieŝ) itd.

## Ćwiczenia. Ekzercoj.

### 1.

Ĉu vi jam estis fininta vian leteron, kiam vi foriris? Jes, mi ĉiam eliras nur, kiam mi estas fininta mian laboron. — La kantisto jam estos kantinta la kantojn je la naŭa horo. Irante je la oka horo vi atidos lin, sed pli malfrue, ĉio estos finita. — Ni estus legintaj la libron, se la majstro estus doninta ĝin al ni; sed ne estas necese, ke ni havu ĝin nun, ĉar ni estas ricevontaj morgaŭ alian libron. — Estas necesege, ke vi estu ricevinta lian leteron antaŭ ol vi ion decidis. — Kiam vi venis, mi jam estis forironta. — Laborante-li gajnis, ludante li perdis. — La afabla junulo estas mata, li estis ĉiam laŭdata kaj li estos enviata. — Tiu ĉi bona libro estas legita, legata, legota de ĉiuj. — Via laboro estas tre bone farita. Mi vidis, ke ĝi estis malrapide kaj zorgeme farata. — Nia domo estas baldaŭ konstruita. Kiam ĝi estos konstruita, vi venos al ni. — Estas dezirinde, ke vi venu baldaŭ. —

## 2.

Miałem właśnie zamiar pisać, kiedy przyszedł twój list i postanowiłem zostać. — On już swoją pracę skończy, kiedy ty go odwiedzisz. — Ja nie byłbym tak zrobił, gdybyś mi był przedtem napisał. — Mój brat był w zeszłym tygodniu tak chory, że nie mógł wyjść. — Gdybyś był tak pracował jak twój brat, byłbyś tak chwalonym jak on. — Pracowawszy, pracując i mając zawsze zamiar pracowania, byłeś, jesteś i będziesz chwalonym. — Wiem, że miano mnie zaprosić, lecz ponieważ mnie dotąd nie zaproszono, nie wiem, czy będę zaproszony. — Pracując, nauczyłem się bardzo wiele. — Kiedy ja przyszedłem do niego, on właśnie miał zamiar wyjść. — To musi być zapłaconem, czy chcesz czy nie chcesz, jest bowiem koniecznem zapłacić wszystko. — Ponieważ było wczoraj bardzo ciepło, spaliśmy w pokoju nie zamykając okien.

## 3.

Revidinte sian patrinon post longa malsano, la filo ekkriis, ke tiu vido lin resanigos. — Ne salutita de siaj amikinoj, la kuracistedzino estis elirinta el nia domo, kiam ni alvenis. — Antaŭ ol skribi, vi estas devinta paroli kun ŝi pri tiu afero. Sendube, patro, kaj efektive mi estis intencinta diri al ŝi ĉion buŝe, sed ĉar ŝi estis foririnta, mi

necese skribis, por ke ŝi sciiĝu mian volon. — Kiam la vento estis faliginta la flavigintajn foliojn de la arboj, mi preferis restadi hejme, ol promena-di en la arbaro, kvankam ofte la vetero estis tre agrabla. — Tuj kiam mia kuzino estos alveninta, ni disiros: mi forironte Parizon, ŝi restante sola hejme. — Ne timante la hundojn, dormu kato, trankvile en la hundejo. — En la lingvo Esperanto ni vidas — kaj ni estas sendube pravaj — la estontan duan lingvon de ĉiu instruita homo. —

## 4.

Idźcie naprzód, moje dzieci, bez obawy (nie bojąc się) niebezpieczeństwa! — Zanim pociąg nadejdzie, mam dosyć czasu, aby pobiec do domu i powiedzieć szwagrowi, by pojechał z nami na wieś. Dobrze! Piotrusiu, zrób to, ale spiesz się! — Skoro tylko śnieg pokryje ziemię, nie będziemy tak często biegać w ogrodzie. — Wy musicie iść prędzej do domu, bo skoro tylko mgła pokryje dolinę, będzie tak ciemno, że chociaż znamy dobrze drogę, jednak możemy łatwo ją stracić. — Bylibyśmy wczoraj bardzo chętnie poszli na przechadzki, gdyby temperatura nie była tak mroźna. — Właśnie zaczął silny wiatr dąć i pewnością byłby zaczął śnieg padać, dlatego woleliśmy zostać przy ognisku. — Kiedy przybyliśmy do domu, dowiedzieliśmy się, iż ojciec, nie napisawszy przed-

tem, aby mu pokój przygotować, przyjechał wieczornym pociągiem. —

### **Rozmówki. Interparoloj.**

Sonjo (aŭ: Sofinjo). — Erĉjo (aŭ: Erneĉjo). —  
Niĉjo (aŭ: Nikolĉjo, Nikoĉjo, Nikĉjo).

Erĉjo.

Kian temperaturon vi preferas, Sonjo? la sekan aŭ la malsekan, la varmegan aŭ la glacian, unuvorte kian sezonon?

Sonjo.

Senŝerce mi diros al via grafa Moŝto, ke el ĉiuj sezonoj de l'jaro mi preferas la printempon kaj la majan monaton. — En majo vere revivigas la naturo, la arboj malfermas siajn burĝonojn kaj kovras sin per folioj kaj floroj. Ĉiuj kreskaĵoj parfumas la aeron.

Erĉjo.

Kontraŭe mi preferas la dormadon de l'naturu, la vintron. Estas por mi plezuro rigardi la kamparon kovritan per ĝia mantelo de brilega nego. Se la pluvo falas, mi restas hejme, sidante apud la fajro kaj fumante bonan cigaron aŭ bonegan pipon.

Sonjo.

Kaj vi, Niĉjo? nenion vi diras: kian tempon de jaro vi preferas?

## Niĉjo.

Ho! mi havas guston tute diferenčan de l'via. Dum la printempo oni scias neniam, ĉu oni devas preni la pluvombrelon aŭ bastonon. Mi preferas la aŭtunon. Dum la aŭtuno la temperaturo estas pli agrabla ol en la somero: la marŝo estas plezuro.

## Sonjo.

Vi estas prava, Niĉjo. Rimarku, ke, se ni komparos la sezonojn kun la vivo de l'homo, ni trovos, ke la printempo respondas al la infaneco, la somero al la aĝo de l'pasioj, la aŭtuno figuras la maturecon en la vivo kaj la vintro la maljunecon.

Według L. Beaufronta.

## Słówka. Vortoj.

Dio Bóg  
 universo wszechświat  
 globo kula ziemska  
 mondo ŝwiat  
 naturo przyroda  
 suno słońce  
 astro gwiazdozbiór  
 radio promień  
 lumo światło, jasność  
 luno księżyc  
 stelo gwiazda  
 ĉielo niebo  
 aero powietrze  
 horizonto horyzont  
 temperaturo temperatura

frosto mróz  
 nego śnieg  
 glacio lód  
 nuboj chmura  
 nebulo mgła  
 fulmo błyskawica  
 tondro grzmot  
 vento wiatr  
 maro morze  
 lago jezioro  
 bordo brzeg  
 insulo wyspa  
 monto góra  
 valo dolina  
 fonto źródło

rivero rzeka  
 ponto most  
 vojo droga  
 dezerto pustynia  
 besto zwierzę  
 tigro tygrys  
 lupo wilk  
 vulpo lis  
 azeno osioł  
 aglo orzeł  
 korvo kruk  
 alaŭdo skowronek  
 papago papuga  
 rano żaba  
 vermo robak  
 serpento wąż  
 insekto owad  
 abelo pszczoła  
 araneo pająk  
 formiko mrówka  
 muŝo mucha  
 papilio motyl  
 herbo trawa  
 radiko korzeń  
 branĉo gałąź

trunko pień  
 burgono pączek (kwiatu)  
 kverko dąb  
 abio jodła  
 nesto gniazdo  
 arko łuk  
 fero żelazo  
 vagono wagon  
 ŝerco żart  
 seka suchy  
 klara jasny  
 brila błyszczący  
 ebena równy  
 profunda głęboki  
 fluida płynny  
 krei stworzyć  
 flui płynąć  
 blovi dąć  
 promeni przechadzać się  
 fali padać  
 droni topić się  
 parfumi perfumować  
 dangere niebezpiecznie  
 laŭlonge wzdłuż  
 laŭlarĝe wszerek

### Składnia. Sintakso.

Tak, jak cały język Esperanto, tak samo składnia jego jest nadzwyczaj prostą i człowiek, który umie cokolwiek logicznie myśleć, prawie że nie może się niezrozumiale w Esperancie wyrazić. Charakterystyczne cechy pojedynczych części mowy,

jasne regułki co do użycia pojedynczych przypadków i usunięcie z języka wszelkich wieloznaczności wyrazów, pozwalają z łatwością unikać wszelkich zawłości i niejasności w składni.

Jak w każdym języku, tak i Esperancie najważniejszą zasadą jest wyrażać się jak **najprościej** i jak **najjaśniej**, aby mózdz być zrozumiałym dla wszystkich; należy tedy używać **zdań krótkich** i czasów o ile możności pojedynczych.

W szczególności:

**Przedimka** 1a należy używać tylko, gdy jest mowa o osobach lub rzeczach znanych; zastępuje on częstokroć słaby zaimek wskazujący. Wogóle przedimka należy używać raczej rzadziej niż za często. —

**Przymiotnik** można kłaść bez różnicy przed lub po rzeczowniku, do którego się odnosi: belaj floroj albo floroj belaj estas en ĝardeno. Przymiotniki i imiesłowyy użyte jako przydawka przy przedmiocie, kładą się zawsze w przypadku pierwszym, a stosują się do przedmiotu tylko co do liczby: mi vidis lin ĉe tablo sidanta kaj libron leganta. Przy użyciu imiesłowów jako przydawki zamiast przymiotnika, należy pamiętać, iż imiesłów oznacza zawsze **chwilowość** a przymiotnik **stały** przymiot osoby lub rzeczy.

**Przeczenie** „nie” kładzie się zawsze przed czasownikiem, o ile nie chodzi o zaprzecze-



nie jakiegoś poszczególnego wyrazu; w drugim wypadku kładzie się przeczenie przed tym właśnie wyrazem: mi **ne volas** legi libron, mi **ne libron** volas legi.

Równocześnie dwa przeczenia istnieć nie mogą.

Po słowie może stać jeden tylko czwarty przypadek: pardoni la malamikon albo pardoni al la malamiko **lecz**: pardoni al la malamiko lian kulpon **nie zaś**: pardoni la malamikon lian kulpon.

Wyraz bezokoliczny jest tu częściej używany niż w języku polskim: widziałem go przechadzającego się: mi vidis lin promenanta, albo: mi vidis lin promeni.

Szyk w zdaniu jest zwykle prosty: podmiot, orzeczenie, przedmiot bliższy itd. Szyk ten można jednak dowolnie zmieniać, byle tylko nie ucierpiała na tem jasność myśli. Wyraz, na który chcemy położyć nacisk, kładzie się na początku zdania.

Zdanie pytające zawsze się rozpoczyna od zaimka lub przysłówka pytajnego albo od partykuły **ĉu**. Czynności **pewne, rzeczywiste** wyraża się trybem oznajmującym: mi scias, ke li venos; se pluvos, mi ne iros promeni.

Czynności wątpliwe i warunkowe wyraża się trybem warunkowym: se mi estus sana, mi estus feliĉa,

Czynności r o z k a z a n e (z a k a z a n e) lub ż y c z o n e wyraża się trybem r o z k a z u j ą c y m ; mi volas, ke vi skribu, mi permesis al li, ke li venu ; bruligu kandelon, porke (por ke) estu lume! estu feliĉa obyŝ był szczęśliwy.

S p ó j n i k i rządzą trybem oznajmującym, gdy jest czynność pewna, rzeczywista — warunkowym, gdy jest warunkową — rozkazującym, gdy jest celową, lub życzoną. S p ó j n i k i **antaŭ** ol zanim, **anstataŭ** zamiast, **por** dla, rządzą trybem bezokolicznym, **por ke (porke)** i **ke** (tylko celowe!) rządzą trybem rozkazującym.

Imiona własne zachowują pisownię, jaką mają we własnym języku, jeśli w tym języku używanym jest alfabet łaciński, jednak obok, w nawiasie należy podać w pisowni Esperanto brzmienie owego słowa: Shakespeare (Ŝekspir). W przeciwnym razie używa się pisowni esperanckiej (fonetycznej). Bardziej znane nazwy i nazwiska należy pisać według prawideł języka Esperanto: Varsovio, Lvovo, Galicio, Ŝiller itd.

Dzielić wyrazy można dowolnie, najlepiej jest jednak dzielić według ich części składowych gramatycznych: for-kur-ant-o, don-it-a, fajr-er-o, dis-iĝ-i itd.

Chcących dokładniej poznać składnię języka Esperanto odsyłam do broszury P. Eructiera „Esperanta Sintakso“.

## Literaturaĵoj.

### I. Prozaĵoj.

Viro havis grandan familion kaj nur multajn enspezojn. La vivo en la urbo estis tro multekosta al li. Do li foriris sur la kamparon. Tie li luis malgrandan domon kaj dungis nur unu veturigiston kaj unu servistinon. Sed ĉiun matenon li aŭdis disputon en la kuirejo inter la servistino kaj la veturigisto. Fine li ne povis elporti ĝin plu. Li vokis ambaŭ al si kaj diris: „Ĉiun matenon mi aŭdas disputon inter vi. Kiu estas la kaŭzo?. — La servistino respondis unue: „Matene mi havas multon por fari. Mi devas balai kaj senpolvigi la kvar ĉambrojn, lavi kaj vesti la infanojn kaj prepari matenmanĝon por kvin personoj. Krom tio mi devas iri al farmulo por preni la kremon. La farmulo kiel vi scias, loĝas unu horon de tie ĉi. Mi perdas unu tutan horon nur pro la kremo. Dume la veturigisto estas en la kuirejo kaj faras nenion. Mi petas lin, iri anstataŭ mi pro la kremo, sed li ne faras ĝin. Pro tio ni disputas. — La sinjoro turnis sin al la veturigisto kaj diris: „Kion vi diras pri tio?“ — „Tio ne estas mia devo“, respondis la veturigisto, „vi ne dungis min pro tio“. — „Do“, respondis la sinjoro, kio estas via devo?“, — „Mia devo“, respondis la veturigisto, „estas, purigi la veturilon, mangigi kaj pu-

rigi la ĉevalojn, jungi kaj veturigi“. — Vi estas tute prava, diris la sinjoro, „kaj kiel mi vidas, vi bone konas vian devon, vi devos fari nenion ol vian devon. Sed mi ordonas al vi, jungi, kaj veturigi la servistinon al la farmulo pro la kremo. Tio do certe estas via devo?“.

### **Rimedo kontraŭ la Esperantismo.**

En unu urbeto en gaja societo oni parolis pri la ĥolero kaj pri la novaj rimedoj kontraŭ ĝi. En la societo sin trovis ankaŭ unu kuracisto kaj unu juna homo, kies sola celo en la vivo estis bone manĝi, bone trinki kaj amuzi fraŭlinojn, kaj kiu pensis pri si, ke li estas eksterordinare sprita, amis ĉion kritiki nenion sciante. Kiam la kuracisto rakontis pri la novaj rimedoj kontraŭ la ĥolero, la junulo interrompis lin kaj diris: sed ĉu via scienco trovis jam ankaŭ efikajn rimedojn kontraŭ la plej nova malsano, kiu nun vastiĝas en la mondo — kontraŭ la esperantismo? — Kio estas esperantismo? demandis unu fraŭlino. — Esperantismo, respondis la junulo kun mieno de granda scienculo, estas aligado al la nove elpensita lingvo, kiu havas la nomon „Esperanto“. Tiu ĉi malsano konsistas en tio, ke homoj, kiuj ofte ĝis nun estis tute prudentaj, ricevas atakon de frenezo kaj komencas lerni la novan lingvon, ili ricevas varmegon, kaj en la deliro, kaŭzita de tiu ĉi varmego,

ili komencas paroli pri la „estonteco“ pri la „frateco de la popoloj“ k. t. p. ; ekster tio ili ricevas la tre danganan pasion infekti per sia malsano kiel eble pli da aliaj homoj kaj en tio ĉi kuŝas la plej granda danĝero de tiu ĉi malsano. Oni diras, ke tiu ĉi malsano infektis jam multajn urbojn kaj landojn. Ĉu vi elpensis jam ian rimedon kontraŭ tiu ĉi malsano, sinjoro doktoro? Jes, respondis la kuracisto (kiu okaze mem estis esperantisto), mi profunde esploris tiun ĉi malsanon kaj mi havas kontraŭ ĝi tre efikan rimedon. La baciloj de tiu ĉi malsano portas sin en la radioj de la suno, kaj en mallumo ili ne povas vivi, tial la plej bona rimedo kontraŭ la esperantismo estas: sidi ĉiam en profunda mallumo kaj allasi al si neniam radion de la suno.

### **La reĝo kaj la servisto.**

Tatara rakonto, tradukita de A. Kofman,  
(El Esperantaj Prozaĵoj).

Reĝo sidis je sia tablo kaj atendis la alporton de manĝaĵoj. Sed unu el la servistoj, kiu estis tre timema, faletis kaj kelkaj gutoj de la buljono ŝprucis sur la veston de la reĝo. La reĝo koleris kaj ordonis senkapigi la mallertulon. La malfeliĉulo pensis: „Mi estas filo de la morto, mia savo estas nebla!“ kaj li prenis la buljonujon

kaj elverŝis enhavon sur la reĝon. Tiu ĉi miregis kaj ekkriis: „Ho, junulo, ĉu vi estas posedata de frenezo? Kion vi faris? La servisto diris: „Mia reĝo, mi ne freneziĝis“, miaj pensoj estas en ordo. Mi kuraĝis fari tion ĉi por danki vin pro via boneco al mi. Nun la homoj ne diros pri vi: la reĝo egzekutis malfeliĉulon pro ia bagatelo; ili laŭdos vin kaj diros: la reĝo estas tute prava kaj neriproĉinda, ĉar la servisto montris teruregan kaj nepardonindan arogantecon. La reĝo profundigis en pensojn kaj diris: „Ho junulo, malbone aganta kaj bone vin senkulpiganta, mi pardonas vian abomenan faron pro via lertega klarigo. Kaj la reĝo faris al li bonan donacon.

### **Ombroj.**

Komenco de novelo de Boleslav Prus, tradukita el la lingvo pola de Dro Kabe. (El „Bohema Esperantisto“).

Kiam la briloj de l'suno estingiĝas sur la ĉielo, de l'tero leviĝas la krepusko. La krepusko — la granda nokta armeo de miloj da nevideblaj taĉmentoj kaj milionoj da batalistoj. Potenca armeo, kiu de nememoreblaj tempoj batalas kontraŭ la mondo, forkuras ĉiumatene, venkas ĉiuvespere, regas de la subiro ĝis la leviĝo de l'suno kaj tage rompita, kaŝas sin en nestoj kaj atendas. Ĝi atendas en la montaj profundaĵoj kaj en la keloj de

l'urboj, en la arbaraj densaĵoj kaj en la lagoj mal-  
lumaj. Ĝi atendas kaŝante sin en la eternaj kaver-  
noj de l'tero, en la minejoj, en la kavoj, en la  
anguloj de l'domoj. Distirita kaj ŝajne forestanta,  
ĝi tamen plenigas ĉiujn kaŝejojn. Ĝi estas en ĉiu  
fendo de l'ŝelo de l'arboj, en la faldoj de l'homa  
vesto, ĝi kuŝas sin sub la plej malgranda sablero,  
kroĉiĝas je la plej maldika aranea fadeno kaj aten-  
das. Timigita en uno loko, ĝi tuj transiras en alian,  
uzante ian okazon por reveni tien, de kie oni for-  
pelis ĝin, por surrampi neokupatan postenon kaj  
superverŝi la teron . . . .

### La tri gutoj.

Portugala rakonto tradukita de Dro I. Avellar  
(El Esperantaj Prozaĵoj).

Albo, la bona feino, kiu zorgas pri la fianĉi-  
noj, Albo, kiu loĝas en la pupilo blua de l'virgu-  
linoj senpekaj, pasante iam matene apud rozo,  
aŭdis sian, nomon elparolitan de tri gutoj treman-  
taj. Proksimiĝante kaj sidigante en la koron de  
l'floro, ŝi demandis afable: „Kion vi volas de mi  
gutoj brilaj? — Venu solvi demandon, diris la  
unua. — Diru! — Ni estas tri malsamaj gutoj,  
naskiĝintaj diversdevene; ni volas, ke vi diru al ni,  
kiu el ni estas la plej merita, kiu estas la plej  
pura. — Mi konsentas: parolu, guto brila“.

Kaj la unua guto tremante parolis: „Mi venas el nuboj altaj, mi estas filino de l'grandaj maroj. Mi naskigis en la senlima oceano, antikva kaj potenca. Vizitinte marbordojn de mil fulmotondroj skuegita, mi estis sorbita de nubo. Mi iris ĝis la altaĵoj, kie brilas la stelo, kaj ruligante de tie, inter fulmoj mi falis en la floron, en kiu nun mi ripozas. Mi prezentas la maron. — Estas nun via vico, guto brila diris la feino al la dua. — Mi estas la roso, kiu nutras la liliojn; mi estas fratino de l'opalaj lunbriloj, filino de l'nebuloj, kiuj sin malvolvas, kiam la nokto mallumigas la naturon. Mi reprezentas la matenkrepuskon. Kaj vi? demandis Albo la plej malgrandan. — Mi havas nenian indon. — Parolu, el kie vi venas? — El la okuloj de fianĉino; mi estis rideto, mi estis kredo, mi estis espero, poste mi estis amo, — hodiaŭ mi estas larmo.

La aliaj ridas je l'guteto, sed Albo, malfermante siajn brakojn, prenas ĝin kun si kaj diras: Tiu ĉi estas la plej merita, tiu ĉi estas la plej pura. — Sed mi estis la maro!... Kaj mi estis l'atmosfero!... Jes, tremantaj gutoj; sed tiu ĉi estis la koro... Kaj ŝi malaperis en la bluaĵo, portante la humilan guton.



## Letero pri la deveno de Esperanto.

(Eltiro el privata letero de Dro Zamenhof.)

...Vi demandis min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian, kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto de l'momento de ĝia naskiĝo ĝis tiu ĉi tago? La tuta publika historio de la lingvo, tio estas komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi, estas al vi pli-malpli konata; cetere tiun ĉi periodon de la lingvo estas nun, pro multaj kaŭzoj, ankoraŭ neoportune tuŝadi; mi rakontos al vi tial en ĝeneralaj trajtoj sole la historion de la naskiĝo de la lingvo. Estos por mi malfacile, rakonti al vi ĉion tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis. La ideo, al kies efektivigo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe mi — estas ridinde ĝin diri — en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis; mi vivis ku ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris super ĝi, kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo.

Mi naskiĝis en Bielovstoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bielovstoko la loĝantaro konsistas el

kvar diversaj elementoj; Rusoj, Poloj, Germanoj, kaj Hebreoj: ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeĉon de diverslingveco kaj konvinkigas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn. Oni edukadis min kiel idealiston oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj k. t. p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi „doloro pro la mondo“ ĉe la infano. Ĉar al mi ĉiam ŝajnis, ke la „grandagaj“ posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos granda mi nepre forigos tiun ĉi malbonon...

### **Modeloj de leteroj de Ŝango (Kambioj).**

El Kondukanto de Grabowski.

Krakovio, 1-a Januaro 1906.

Post vido pagu tiun-ĉi unuan leteron de ŝanĝo al sinjoro A., la sumon de 236 fr. (ducent tridek ses frankoj), valoron ricevitan kaj metu ilin en mian konton laŭ avizo (sciigo).

Al sinjoro P. komercisto en Lvovo.

Berlin, 7-a Marto 190...

Monaton post hodiaŭ pagu por tiu-ĉi unua letero de ŝango laŭ la ordono de sinjoro L. la sumon de ducent frankoj sesdek centimoj, valoron ricevitan, kaj metu ĝin en konton laŭ avizo.

Al sinjoro E. komercisto en Nantes.

London, 6-a Februaro 190...

Sinjoro!

Mi tratis hodiaŭ sur vin la sumon de kvarcent kvindek frankoj, pagotaj post vido al sinjoro L. aŭ laŭ lia ordono kaj mi vin petas pagi tiun-ĉi traton kaj meti en mian konton.

Kun estimo

N. N.

### Ŝuldatesto.

London, 12. Februaro 190...

La 12-an Majon de l'jaro kuranta mi promesas pagi al Sinjoro Evans, aŭ laŭ lia ordono la sumon de... funtoj sterlingoj, valoron ricevitan.

T. B.

### Kvintanco de ricevo.

Mi certigas per tio-ĉi, ke mi ricevis de sinjoro H. la sumon de dudek frankoj kiel procentoj por du jaroj ĝis 1-a Februaro de l'jaro kuranta, de la sumo de ducent frankoj, kiun li ŝuldas al mi.

Rouen, 30 Aprilo 190.

N. N.

### Komerca korespondado.

(El „Komercaj leteroj“ de Berthelot & Lambert.)

Al Sinjoro Fürst, Berlino.

Barcelona, 5-an Febr. 1902.

Respondante vian estimatan de 1-a nuna, ni dankas vin pro via propono, kaj ĉe l'okazo ni plezure akceptos viajn servojn. Ni petas vin antaŭ ĉio, ke vi sendu viajn plej malaltajn kondiĉojn, por ke en la okazo de bezono ni povu kalkuli precipe la koston de viaj artikoloj. Kvankam dum la nuna senmovado de komerco ni ne povas doni al vi tuj la certigon de grandaj negocoj, ni tamen esperas ke, almenaŭ en la estonteco nia kunligo estos kontentiga por la ambaŭ partoprenantoj. Ni atendas vian respondon kaj restas kun tuta estimo

Cuchillo & Fratoj.

### Italaj proverboj.

Tradukitaj de Marignoni. (El „Lingvo Internacia“) Dio sendas malvarmon laŭ vestoj. — Hundo, kiu bojas, ne mordas. — Ju pli irados vi malrapide, des pli alvenos vi malproksime. Kia cerbo, tia ĉapelo. — Kiu faras metion ne sian, faras supon en korbo. — Kiu frue donas, duoble donas. — Kiu ridas, levas najlon el sia ĉerko. — Malsamajn kapricojn havas homoj, tiu gustas tortojn, tiu ĉi pasteĉojn.

## II. Versaĵoj.

(Kanteto pola.)

Sur la valo neĝa vento  
 Blovas ĉiam pli;  
 Fajro sur kameno mia  
 Krakas ĉirkaŭ mi.

Ĉe l'kamen'el pipo ringe  
 Fumon lasas mi...  
 Ĉiuj rememoroj miaj  
 Flugas for kun ĝi.

Kie floroj, la esperoj,  
 La junec' de or' ?  
 Kiel vento la blovanta  
 Ili flugis for !

Vent' sen celo, mi sen celo  
 Kun vi, fumo, tri...  
 Tri sen celo en la mondo  
 Kune flugu ni !

### Al La Virino.

(El. Z. Krasiński.)

Se koron vi logas per okul-kristalo,  
 Turmentas per vanta de pensoj sekeco,  
 Ne estas ankoraŭ vi viv'-idealo,  
 Ne estas ankoraŭ virina beleco.

Modesto sen scio, aŭ buŝ' de karmino,  
 Hodiaŭ malmultan nur havas valoron ;  
 Ne esti — elkreski vi devas virgino,  
 Pasante la tutan en mondo doloron.

Inspiroj, turmentoj, da larmoj multeco  
 Ekbrilos radie per sankta dieco,  
 Kaj lumos eterne vizaga la palo ;

Kaj kiam elplektos, sur frunto marmora,  
 La kronon de l'forto la vivo dolora :  
 Vi tiam beleco ! tiam idealo !

### **Kanteto de Ofelio.**

(El Shakespeare).

Mia kara, mia belo  
 Estis brava, juna Dano  
 Portis plumojn sur ĉapelo  
 Kaj bastonon en la mano.

Vane estas la espero.  
 Li jam mortis, ne revenas !  
 Lian kapon kovras tero  
 La piedojn ŝtono tenas.

Ĉemizeton oni metis  
 Sur karulon inter ploroj,  
 Sur la tombon oni ĵetis  
 Multon el la kampaj floroj.

El Hamleto, de Dro Zamenhof.

### Nokta poemo.

de Petro Preradoviĉ (el lingvo Kroata).

Ronedancas helaj steloj  
 Sur ĉiela blua rondo,  
 Dancas nur mallaŭte, dolĉe,  
 Por ne vekti nian teron.  
 Ĉar la tero estas laca  
 De la manoj laborintaj,  
 Del' piedoj iradintaj  
 Kaj de koroj, kiuj batis.

Esperantigis K. Koller.

### La Vojo.

Tra densa mallumo briletas la celo,  
 Al kiu kurage ni iras,  
 Simile al stelo en nokta ĉielo,  
 Al ni la direkton ĝi diras.  
 Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,  
 Nek batoj de l'sorto, nek mokoĵ de l'homoj,  
 Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita  
 Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kurage kaj ne flankigante  
 Ni iru la vojon celitan!  
 Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
 Traboras la monton granitan.  
 L'espero, l'obstino, kaj la pacienco —

Jen estas la signoj, per kies potenco  
 Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
 Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam lacigas,  
 Pri l'tempoj estontaj pensante.  
 Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, —  
 Ni semas kaj semas konstante.  
 „Ho, ĉesu!“ mokante la homoj admonas, —  
 „Ne ĉesu, ne ĉesu!“ en kor'al ni sonas, —  
 Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,  
 Se vi pacience eltenos.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj  
 Velkantajn foliojn deŝiras,  
 Ni dankas la venton, kaj, repurigataj,  
 Ni forton pli freŝan akiras.  
 Ne mortos jam nia bravega anaro,  
 Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,  
 Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,  
 Al cel' unu fojon signita.

Nur rekte, kurage kaj ne flankiĝante  
 Ni iru la vojon celitan!  
 Eĉ, guto malgranda, konstante frapante,  
 Traboras la monton granitan.  
 L'espero, l'obstino kaj la pacienco, —



Jen estas la signoj, per kies potenco  
 Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
 Atingos la celon en gloro.

### En Svisujo.

(El J. Słowacki).

#### I.

De kiam ŝi flugis per sono la ora,  
 Mi svenas, sopire sekigas, dolora ;  
 Ne scias mi, kial l'anim'al ĉieloj  
 Ne flugas el cindroj post ŝi, al angeloj ?  
 Pro kio ne flugas al mondo alia,  
 Al tiu savita, amata, la mia !

#### II.

En Svisaj la montoj jen estas kaskado :  
 De l' Aar lazura la akvo - falado.  
 Ke tien rigardu la kap' turniganta !  
 Vi vidas ĉielarkon sur kavo ŝaŭmanta ?  
 Argentajn nebulojn sin tuta pendigas,  
 Nenio ĝin miksas, nenio forigas ;  
 Nur iam ŝafido la blanka trairas  
 La arkon ĉielan, en valo sur randoj  
 Mordeti je rozoj florantaj, juglandoj ;  
 Aŭ ia kolombo, ĉar akvon deziras,  
 Fiera, estante al briloj simila,  
 La arkon rapide traflugas, la brila.

Mi tie ŝin vidis! tuj amo min prenis;  
 Ke ŝi el pluvarko, el ŝaŭmo elvenis,  
 Mi kredi komencis, la kredo nun restis:  
 Tiel luma de sunaj radioj ŝi estis!  
 Tiel plena ŝi estis da lumo anĝela!  
 Kaj per la lazura pupil' tiel hela!  
 L'okuloj transiris de pied'al plekt' hara:  
 Por ili ŝi estis amata kaj kara;  
 Kaj post tiu sento, ekami iganta,  
 Ekiris la koro, l'animo sekvanta;  
 Kaj kiel rapide komencis l'amado,  
 Ke volis mi flugi al ŝi tra l'kaskado;  
 Mi timis: ŝi flugos per pala vidaĵo;  
 Antaŭ ol l'animo kun krio vekigos,  
 En arko ĉiela, kaskad' profundajo,  
 Ŝi falos, sin solvos kaj de mi forigos.  
 Mi timis kiel homo en songo magia,  
 Ĉar jam mi ŝin amis, ŝi estis jam mia.  
 Mi tiel renkontis sin solan, sub hela  
 Pordego kolora de l'arko ĉiela.  
 Surblovis min ĉarme de l'amo ekblovo,  
 Okul' mallevente, mi staris sen movo.



## Omyłki druku. Preseraroj.

---

Str.	9	wiersz	16	z góry	ma być	Iam zam.	Jam
"	36	"	6	"	"	tago	" ta o
"	42	"	5	z dołu	"	la	" ta
"	51	"	2	z góry	"	pentristo zam.	petristo
"	52	"	2	z dołu	"	saluton	" sulutan
"	55	"	3		"	eksterlando	" ekslerlando
"	57	"	1	z <sup>lato</sup> góry	"	ovajo zam.	avajo
"	63	"	4	"	"	(ia) jakiŝ	" (ia) jaki
"	64	"	6	"	"	Ia	" Ja
"	64	"	8	"	"	Ies	" Jes
"	93	"	5	z dołu	"	bonegan	" benegan
"	98	"	2	"	"	Fructiera	" Eructiera
"	111	"	5	"	"	flankiĝante	" flankiĝante

---